

Gazeto 
 *Andaluzia*

Andaluzio per si, por Hispanio kaj la Homaro

27-a Jarkolekto * Marto 2011 * N-ro 91

ISSN 1576 - 0618

**UNUA JARCENTO DE ESPERANTO
EN SEVILO KAJ 16-a ANDALUZIA
KONGRESO DE ESPERANTO**

De la **21**-a ĝis la
23-a de **OKTOBRO**
2011

Andaluzia Esperanto Unuiĝo
www.andaluciaesperanto.blogspot.com

Gazeto Andaluzia
Fundada por D. José Garzón Ruíz, en San Fernando (Cádiz) en 1910.
Órgano oficial de la **Asociación Andaluza de Esperanto.**

EDITA: Asociación Andaluza de Esperanto
REDACCIÓN: C/ Anfora 6 5-D 29013 Málaga (Hispanio)
DEPÓSITO LEGAL: MA-1136/86. ISSN: 1576-0618.
IMPRIME: Litopress SL Córdoba

DIRECTOR: Ángel ARQUILLOS LÓPEZ
REDACTOR: José María RODRÍGUEZ HERNÁNDEZ
(esperanto14@ono.com)

Kunlaboris ĉi-numere: José Roldán. Antonio Rodríguez

ENHAVO

Esperanto en Andaluzio	3
Informo de Andaluzia Esperanto-Unuiĝo	6
Baelo Klaŭdia	7
Eksterordinara Ĝenerala Kunveno de A.E.U.	11
La instru-metodo Polgar	12
16-a Andaluzia Kongreso de Esperanto	15
Salut-vortoj de Sevila Esperanto-Asocio	17
Programo de la 16-a Andaluzia Kongreso de Esperanto	18
Prelegoj kaj prelegantoj	20
P'lano de la Kongresejoj kaj ĉirkaŭaĵoj.....	22
Kulturaj programeroj	24
Turismaj programeroj	25
Poezio	28
Paĝoj de Nia Historio	29
Flamenko	33
Humoro	37
Misteroj kaj Legendoj de Andaluzio.....	38
Andaluza Kuirarto	40

Nota: pri la enhavo de la artikoloj respondecas la aŭtoroj mem.
La redaktoro rajtas rifuzi nepetitajn artikolojn.



ESPERANTO EN ANDALUZIO



SEVILO

Okaze de la celebrado de la unua jarcento de la fondiĝo de Sevila Esperanto-Asocio S.E.A. fare de Trinidad Soriano kaj aliaj kunuloj en la jaro 1911-a, la pasintan 7-an de aprilo ĉi tiu asocio okazigis prelegon ĉe la Oficiala Kolegio de Flegistoj. La prelego temis pri “Esperanto, io pli ol lingvo”, la preleganto estis José Roldán León, nuntempa Sekretario de la Asocio.

Trideko da personoj ĉeestis la prelegon en agrabla kaj amikeca etoso. Antaŭe, Lola García kaj Antonio Rodríguez, estraranoj de Sevila Esperanto-Asocio, parolis pri la historio de la grupo kaj ili sciigis pri la eventoj kiujn la Asocio planas okazigi dum la kuranta jaro 2011-a por inde festi la centjariĝon.



S-ro Roldán León parolis pri Esperanto en Sevilo

KORDOVO

Eldonita de Esperanta Jura Asocio, kunlabore kun Andaluzia Esperanto-Unuiĝo, aperis en Kordovo la 10-a numero de la jura revuo *JURA TRIBUNO INTERNACIA*. La revuo estas prezentita kadre de la

ĉi-jara Universala Kongreso de Esperanto, okazinta fine de la monato julio en Kopenhago (Danio). Ĉi-numere la revuo pritraktas jenajn temojn:

- Skizo de la Dana Jur-sistemo.
- Enkondukon en la Studon pri la Arbitracia Kontrakto.
- La Operacio *Hieronimo* el la internaci-jura vidpunkto.

Ĉi-lastata temo estas tre aktuala, ĉar ĝi temas spri la mortigo de la teroristo Bin Laden fare de la usona armeo ĉe pakistana teritorio.

La revuon oni eldonas ĉi tie en Andaluzio kaj ĝi estas disvastigita tra la tuta mondo, ĉefe al tiuj geesperantistoj kiuj fakas pri juraj aferoj (advokatoj, juĝistoj, jur-profesoroj, ktp.)

ARUNDO

La pasintan 15-an de aprilo niaj arundaj gesamideanoj Fátima Jiménez kaj Juan Diego Ruíz prelegis pri esperanto ĉe la kultura centro *Baba* de Arundo. Ĉeestis preskaŭ dudeko da personoj. La prelego utilis ankaŭ kiel prezento de la ĵus naskita Arunda Esperanto-Klubo, kiu post la okazigo de ĉi tiu prelego ekigis elementan kurson de esperanto. Ni deziras grandan sukceson al ili kaj kompreneble ekde Andaluzia Esperanto-Unuiĝo oni oferas ĉian helpon.



Prezento de Arunda Esperanto-Klubo fare de Fátima Jiménez

MALAGO

La pasintan 26-an de majo, malagaj geesperantistoj kunsidis kun membroj de la ekologia grupo “Ecologistas en Acción” ĉe la kultura centro “*La Casa Invisible*” en Malago. Unualoke, Carmen Sansegundo parolis pri la vivo de Zamenhof kaj la unuaj paŝoj de esperanto, la unuaj kongresoj kaj pri la diversaj grupoj kaj fakaj asocioj ekzistantaj en la Esperanto-movado. Poste, Ángel Arquillos parolis pri la gramatiko de esperanto kaj pri la ekzistantaj perretaj kursoj. Poste okazis babilado inter la interesitoj pri la lingvo kaj la ĉeestantaj geesperantistoj.



Gepartoprenantoj en la prezento kaj debato pri esperanto okazanta ĉe la *Casa Invisible* en Malago.

MALAGO

Kiel anoncite sur la pasinta numero de nia revuo, dum 15 tagoj restis en Campanillas (Malago), la 24-jaraĝa kuba samideano Ronaldo González. Li studis, kune kun aliaj gekolegoj, ĉe la Teknologia Centro de tiu malaga vilaĝo. Li kontaktis kun la malaga esperantistaro, li regas perfekte la internacian lingvon kaj li tre ŝatis la urbon.

INFORMO DE ANDALUZIA ESPERANTO-UNUIĜO

Post la demisio la pasintan monaton aprilon de la Sekretario de Andaluzia Esperanto-Unuiĝo, S-ro Julio Herrero Segura, akorde al la artikolo 19-a de la statuto de la asocio, la estraro nomumis la S-ron José María Rodríguez Hernández kiel novan sekretario de A.E.U. Ĉi tiu nomumo validos ĝis la okazigo de la venonta Ĝenerala Eksterordinara Kunsido de Andaluzia Esperanto-Unuiĝo, okazonta en Sevilo la 22-an de oktobro 2011-a.

NOTA DE LA ASOCIACIÓN ANDALUZA DE ESPERANTO

Habiéndose producido el pasado mes de abril de 2011 la dimisión del Secretario de la Asociación Andaluza de Esperanto, D. Julio Herrero Segura, en cumplimiento del artículo 19 de los estatutos de la asociación, la Junta Directiva ha acordado nombrar para tal puesto al miembro de dicha Junta D. José María Rodríguez Hernández. Dicho nombramiento se extenderá en el tiempo hasta la celebración de la próxima Asamblea General Extraordinaria de la Asociación Andaluza de Esperanto, que tendrá lugar en Sevilla el 22 de octubre de 2011.



Notu la adreson de la nova TTT-paĝo de nia asocio
www.esperantoandalucia.com

BAELO KLAŬDIA

Je 22 kilometroj de Tarifo, en la provinco Kadizo, tuj apud la vilaĝeto Bolonia, troviĝas la restaĵoj de la romia urbo Baelo Klaŭdia. Ĉi tiu urbo fondiĝis dum la 2-a jarcento a.K., sur pli antikva fenica setlejo. Ĝi naskiĝis pro la graveco de la komercaj rilatoj kun la nordo de Afriko. La romia historiisto Estrabon en la jaro 18 p.K. skribis pri Baelo Klaŭdia, kiel la haveno el kie estas eble vojaĝi en *Tingis*, la nuntempa Tangero, ĉe la romia provinco Maŭritano.



La romia urbo Baelo Klaŭdia, fone la Atlantika Oceano.

Tamen, la plej grava ekonomia rimedo de la urbo estis la pekl-industrio. Estas necese memori, ke la tinusoj trapasas la ĝibraltaran markolon kaj ekde la plej antikvaj tempoj, ĝis hodiaŭ mem, ekzistas tipa tinus-kaptado en tiu zono. Apud la pekl-industrio estis gravega la produktado de *garum*, temas pri saŭco produktita el la peklitaj fiŝoj.

La urbo atingis sian plej gravan epokon inter la jarcentoj 1-a a.K kaj 2-a p.K, tiam okazis granda tertremo kaj posta mar-sismo kiu detruis la urbon kaj, kvankam dum la 3-a jarcento la urbo renaskiĝis la enloĝantoj definitive forlasis ĝin dum la 7-a jarcento.

Sendube, unu el la plej belaj allogaĵoj de Baelo Klaŭdia estas la fakto, ke temas pri tipa romia urbo, sur kiu neniu alia urbo stariĝis. Tiel, en la urbo Malago, en Sevilo aŭ en Kordovo estas eble trovi romiajn restaĵojn, tamen aliaj konstruaĵoj malebligas vidi kaj kompreni la romian urbo-planismon. En Baelo Klaŭdia tio ne okazas, tie videblas ĉiuj elementoj propraj de la romiaj urboj, tio estas: la du plej gravaj stratoj, la forumo, la temploj, la baziliko, la administrativaj konstruaĵoj, la teatro, la industria kvartalo, la akveduktoj kaj la ĉirkaŭanta murego.



Bildo reprezentanta la urbon Baelo Klaŭdia komence de la 1-a jarcento p.K.

Unualoke, ni parolos pri la murego. Ĝi ĉirkaŭigis komplete la urbon, kvankam ĝi ludis pli ornaman rolon ol tiu esence defenda, pro la fakto, ke ĝi ne estis tre larĝa. Kvardeko da pordegoj utilis ankaŭ kiel defendiloj. Laŭlonge la murego troviĝas la pordegoj de la urbo, unu kondukis en la urbon *Gades*, la nuntempa Kadizo, alia en *Carteia*, la nuntempa Ĝibraltaro.

Sude de la urbo, tuj apud la marbordo, troviĝas la restaĵoj de la plek-industriaj faktorioj. Temas pri malgrandaj kavoj ĉe la marbordo, kie oni ensaligis la fiŝojn, ĉefe tinusojn. Kiam la saligita tinuso tute sekiĝis, la produktaĵo jam estis preta por esti dissendata tra la tuta Romia Imperio, kie oni gustumis ĝin kiel frandaĵon.

Ene de la urbo estas eble vidi la originalan ŝtonan plankon de la du plej gravaj stratoj. Meze de ili troviĝas la publika placo, aŭ forumo. Tie stariĝas la baziliko, aŭ justica palaco, siatempe duetaĝa konstruaĵo kaj meze de ĝi stariĝas impona statuo de la imperiestro Trajano. Flanke de la forumo troviĝis la administrativaj konstruaĵoj, tio estas: la loka senato, la municipa arkivo, la balotejo, ktp. Kaj fronte al ili la komercaj vendejoj.



Ŝtuparo antaŭ unu el la temploj de la urbo.

Sur la norda parto de la forumo stariĝas kvar temploj, dediĉitaj al la dioj Jupitero, Juno kaj Minervo. Tre apude alia templo dediĉita a la egipta diino Isis, pruvas la ekziston de adorantoj de orientaj dioj kaj diinoj sur la Ibera Duoninsulo.

La plej granda konstruaĵo en Baelo Klaŭdia estas la teatro, kun spaco por 2.000 personoj, kvankam ĝi ne estas tiel bone konservita kiel aliaj romiaj teatroj. Malgraŭ tio, estas eble vidi la lokojn kie sidiĝis la spektantoj, nur viroj, la scenejon kaj la enirejojn de la konstruaĵo.

Verdire, Baelo Klaŭdia estas unu el la plej vizitindaj antikvaj restaĵoj en Andaluzio, nur estas necese deflankiĝi de grava aŭtovojo

(N-340) kaj eniri en belegan zonon plena je montoj kiu finiĝas ĉe unu el la plej belaj plaĝoj de Andaluzio. Vizitinda ankaŭ estas la apuda muzeo, starigita antaŭ malmultaj jaroj, kie eblas vidi maketon reprezentanta la originalan romian urbon kaj malgrandajn objektojn eltrovitaj dum la prifosoj ekigitaj komence de la pasinta jarcento.

Eblas virtuala vizito en Baelo Klaŭdia,
kliku:

<http://www.juntadeandalucia.es/cultura/museos/CABC/index.jsp?redirect=visitaVirtual.jsp>



EKSTERORDINARA ĜENERALA KUNVENO DE ANDALUZIA ESPERANTO-UNUIĜO

Alvoko

Kiel Prezidanto de Andaluzia Esperanto-Unuiĝo / Asociación Andaluza de Esperanto, mi alvokas al ĉiuj membroj de la asocio partopreni en la eksterordinara ĝenerala kunveno, okazonta en Sevilo kadre de la 16-a Andaluzia Kongreso de Esperanto, la proksiman sabaton 22-an de oktobro 2011-a, laŭ la jena tag-ordo:

- 1.- Legado kaj eventuala aprobo de la antaŭa protokolo.
- 2.- Agadoj plenumitaj dum la jaro 2011-a.
- 3.- Elekto de nova estraro.
- 4.- Nuntempa ekonomia stato de la Asocio kaj kotizoj.
- 5.- Projekto “Esperanto en la Universitato”.
- 6.- Biblioteko de Andaluzia Esperanto-Unuiĝo.
- 7.- Petoj kaj demandoj.

Malago, la 22-an de septembro 2011-a.

Subskribis:

Ángel Arquillos López

Prezidanto de Andaluzia Esperanto-Unuiĝo (AEU)

Kiel membro de Andaluzia Esperanto-Unuiĝo / Asociación Andaluza de Esperanto, mi rajtigas al _____
reprezenti min kaj voĉdoni je mia nomo rilate ĉiujn proponoj prezentotaj dum la Eksterordinara Ĝenerala Kunveno de la Asocio, okazonta en Sevilo kadre de la 16-a Andaluzia Kongreso de Esperanto, la 22-an de oktobro 2011-a.

Nomo kaj subskribo de la AEU-membro rajtiganta:

LA INSTRU-METODO POLGAR

Fine de la sesa jardeko de la pasinta jarcento Laszlo Polgar, hungara psikologo, decidis testi sian propran eduk-metodon, bazita sur la devizo *“Genioj estas farataj, ne naskataj”*. Li eĉ verkis libron sub la titolo *“Naski geniulojn”*, pere de kiu li lanĉis alvokon atingi edzinon preta eduki ontajn geniulojn. Al tiu alvoko respondis Klara, hungar-parolanta ukrainino, instruistino. Do, ili klopodis pruvi, ke infanoj estas kapablaj atingi eksterordinarajn sukcesojn, se trejnataj jam de tre frua aĝo en specialista subjekto.

La gepatroj decidis, ke la ŝakludo estus tiu speciala subjekto kaj esperanto la hejma lingvo de la familio. Laszlo Polgar parolis la zamenhofan lingvon kaj li posedis bibliotekon kun pli ol dek mil libroj pri ŝako, laŭ li ŝako *“estas arto, scienco kaj sporto kie la rezultoj de la testo povus atingi mezureblajn rezultojn”*. La paro naskis tri filinojn: Zsuzsa (1969), Zsofia (1974) kaj Judit (1976).



Susan Polgar

Jam 4-jaraĝa, Susan verkis siajn proprajn ŝak-problemojn, kelkaj el ili ankoraŭ oni uzas por instrui superan ŝakon ĉe ŝak-lernejoj. Apenaŭ 15-jara ŝi estis konsiderata kiel la plej bona ŝak-ludistino en la mondo kaj en januaro de 1991, ŝi fariĝis la unua virino akirinta la viran titolon de Grandmajstro. Krome, ŝi parolas flue sep lingvojn, inter kiuj, kompreneble, troviĝas esperanto.

Sofia, 14-jaraĝa, venkis en la ŝak-turniro de Romo en la jaro 1989. Ŝi atingis tiel altan poento-nombro, ke ĝis la jaro

2006 estis la plej bona rezulto por virino okaze de ŝak-turniro. Ŝi dediĉis sin ankaŭ al la arta mondo kaj ŝi flue parolas ses lingvojn.



Zsotia Polgar



Judit Polgar

Sed sendube, la plej sukcesa rezulto de ĉi tiu instru-testo estis la plej malaĝa filino: Judit. 15-jara ŝi fariĝis *grandmajstro*, do eĉ pli juna ol Bobby Fischer, kiu atingis tiun gradon en la jaro 1958. Ŝi ŝakludis, kaj foje eĉ venkis, al la plej bonaj siatempaj ŝakludistoj, inter ili Garry Kasparov aŭ al la mond-ĉampiono Veselin Topalov. Laszlo Polgar, la patro de la tri fratinoj Polgar, ĉiam rifuzis la ideon partoprenigi siajn filinojn nur en virinaj turniroj, ĉar ili devus esti je la sama nivelo ol la viroj. Do, ĉefe Judit Polgar luktis kontraŭ la ideo, ke la plej bonaj ŝakludistoj estas viroj, kaj tiel en la jaro 2005 Judit fariĝis la unua virino en la lukto por la ŝaka mondĉampioneco. Ĝis hodiaŭ ŝi estas la sola virino en la mondo kiu estis inter la dek plej bonaj ŝakludistoj en la mondo, sendepende de la ĝenro.

Do, ĉu geniulo naskiĝas aŭ fariĝas? Eble, ni ĉiuj havas nian propran respondon. Laszlo Polgar montris per sia metodo, ke intensiva edukado regita de la propraj gepatroj kaj bazita sur specifaj lernobjektoj kiel ŝako aŭ esperanto, sendube antaŭenirigas la intelligentkapablon de tri knabinoj. Sendube, jen alia bona kialo por peti la

enirigon de la instruado de la internacia lingvo kiel elektebla lerno-objekto en gimnazioj aŭ universitatoj, ĉu ne?

**UNUA JARCENTO DE ESPERANTO
EN SEVILO KAJ 16-a ANDALUZIA
KONGRESO DE ESPERANTO**

De la **21**-a ĝis la
23-a de **OKTOBRO**
2011

Andaluzia Esperanto Unuiĝo
www.andaluciaesperanto.blogspot.com

16-a Andaluzia Kongreso de Esperanto *Sevilo, de la 21-a ĝis la 23 de oktobro 2011-a*

Jes, ekzistas centoj da esperanto-kongresoj kaj renkontiĝoj tra la tuta mondo, kaj sendube en la plejmulto el ili partoprenas pli da esperanto-parolantoj ol en la Andaluziaj Kongresoj. Do, se mi devas pensi pri reklamo por inviti ĉiujn ĉeesti Andaluzia Kongreso, pri kio mi devus pensi? Facila solvo, temas pri NIA kongreso. Ĝi estas la diskutejo el kiu naskiĝas projektoj, agad-planoj aŭ simple revoj por antaŭenirigi la internacian lingvon en Andaluzio. Ĝi estas la loko kaj la momento kie dekoj da bonaj geamikoj, kaj feliĉe ĉiujare venas pliaj novaj, renkontiĝas por paroli pri la plej diversaj aferoj, sed en esperanto, kompreneble. Ĝi estas la pruvo kiun ni deziras montri al la cetera andaluzia socio pri la ekzisto kaj la bonfarto de unu el la plej taŭgaj eltrovaĵoj por detruigi landlimojn en ĉi tiu malgranda mondo. Do, ĉi ĉio estas la andaluzia kongreso de esperanto.

Ĉi-foje en Sevilo. Jes, antaŭ cent jaroj grupeto de novbakitaj esperanto-parolantoj renkontiĝis ĉirkaŭ la eminenta sevila esperantisto Trinidad Soriano, kaj ĉiuj ili decidis krei la Sevilan Esperanto-Asociacion. Cent jarojn poste *iliaj nepoj ilin benas*, kaj ĉi tiu frazo ne estas nur bela strofo de kantaĵo, ĉar laŭlitere nepo de unu el tiuj fondintoj estas nur la animo de la nuntempa Sevila Esperanto-Asocio. Pro tio, ni deziris profiti la agadojn de Sevila Esperanto-Asocio por festi ĝian jubileon kaj organizi samtempe al tiuj agadoj la 16-an Andaluzian Kongreson de Esperanto ĉi tie en Sevilo.

Kaj, se paroli pri la nuntempa situacio de esperanto en Andaluzio, mi devas agnoski, ke ni vivas interesajn momentoj. Dank'al interreto aperas novaj parolantoj, kiuj lernis la zamenhofan lingvon ne pere de organizitaj kursoj, sed ĉefe dank'al la centoj da TTT-paĝoj kie estas eble ekkoni kaj eĉ lerni esperanton, ĉefe en *lernu.net*. Tiel, lastatempe novaj esperanto-parolantoj kontaktis kun Andaluzia

Esperanto-Unuiĝo por peti informojn pri la esperanto-movado, kaj bonŝance tio okazis eĉ en la plej malgrandaj kaj izolitaj lokoj tra la tuta Andaluzio.

Kompreneble, ni ankaŭ devos paroli pri problemaj aferoj. Lastatempe AEU trapasis malfacilajn momentoj, ĉefe pro la problemoj kaŭzitaj de internacia asocio kun kiu ni nuligis kian ajn kunlaboradon.

Do, jen la celoj de ĉi tiu Andaluzia Kongreso de Esperanto: unue, praktiki la lingvon; due fari tion ĉe amikeca etoso kaj trie pritrakti plenumendajn aferojn celantaj montri al la andaluzia socio, ke esperanto vivas, ke esperanto bonfartas, ke esperanto utilas kaj ke esperanto estas lerninda lingvo.

Fine, bonvenon al Sevilo, dankojn pro via partopreno. Ni esperas, ke la etoso pripensita de niaj sevilaj gesamideanoj sendube envolvos nin kaj nin ĝuigos en unu el la plej belaj urboj de Andaluzio.

*José María Rodríguez Hernández
Prezidanto de la Organiza Komitato de la Kongreso*



Salut-vortoj de Sevila Esperanto-Asocio

Centoj da jaroj antaŭ nun, grupeto revanta en nova eltrovita lingvo, ekis vojon por ĝin enkonduki disde ĉi anguleto de l' ĉi nia mondo, nome Sevilla – Sevilo – Seviljo.

Certe iuj tiaj bravuloj kaj pioniroj iam pensis tiutempe en ege fora tempo, nome, jarcenton poste. Tiun tempon jam alvenis kaj ni estas la respondantoj por demandoj far tiamaj demandintoj: kio okazus pri Esperanto post cent jaroj?

La respondon vi povas vidi per ĉi vortoj, povas tuŝi per ĉi kongreslibro kaj plie povas aŭdi en tiu ĉi kongreso. Kaj la estonto kaj la estinto kuniĝas en nia nuno por montri alies futuro.

Tiel nun venas al niaj lipoj frazon ege bela, saĝe malnova, same kor-nova: *Esperanto kiel stel' gvidu nin al nia cel'.*

Vi, gekaraj ĉeestantoj, havas la devon konscii pri privilegio de ni havata: ĉeesti la estonton, sin senti spektantojn kaj partoprenantojn en fenomeno kies fajreto lumigas jaron post jaro por atingi centjaron post jarcento.

Espereble nia centjariĝo estu lumturo montranta la vojon por venontaj centoj da jaroj pliaj.

Do, gekaraj samideanoj kaj samlingvanoj: en ĉi mondanguleto havu la bonvenon kaj havu la bonŝancon pasigi unikan nun-tempeton.

Memore al ĉiuj kies strebo ebligis utiligi nun komunikilon unikan kaj komprenilon pac-agantan, estu celebrata ĉi kongreso kaj estu ĝi ĉiam memorota.

*Antonio Rodríguez Gasch
Sevilla, Oktobro 2011*

PROGRAMO

16-a Andaluzia Kongreso de Esperanto

Vendredo 21/10/2011

Ekde la 16:00: Akceptado de la partoprenantoj kaj disdonado de dokumentoj.

17:30 Salut-vortoj kaj malfermo.

18:00 Prezento de la programo.

18:30 Prezento de la libro "Cent jaroj da Esperanto en Sevilo" fare de Juan de Dios Montoto.

19:00 Ekiro al Kvartalo Sankta Kruco.

19:30 Gvidata vizito al kvartalo Sankta Kruco.

22:00 Tipa sevila manĝado (*friktita fiŝaro*). Invito de Sevila Esperanto-Asocio. Ĝi okazos ĉe la kvartalo Triano.

Sabato 22/10/2011

9:00 Promenado ĝis la Muzeo de Belaj Artoj de Sevilo.

9:30 Gvidata vizito al la Muzeo.

11:00 Reveno al la kongresejo.

11:30 Prelego pri literaturo kaj poezio en esperanto, fare de Jorge Camacho.

13:00 Informo pri agadplano de junulara organizo en Andaluzio, fare de Fátima Jiménez kaj Juan Diego Díaz.

14:00 Tagmanĝo.

17:00 Informo pri la nuna situacio kaj projektoj de Andaluzia Esperanto-Unuiĝo, fare de José María Rodríguez.

- 17:30
- Okazigo de la Eksterordinara Ĝenerala Kunveno de AEU
 - Instruado de esperanto (eblas diversaj niveloj laŭ partoprenantoj).
 - Projekciado de esperantaj filmoj.

19:00 Prelego pri esperanto en la universitato, fare de José María Rodríguez.

- 20:00 Projekciado de esperanta filmo.
20:30 Prelego pri Lingvaj Mitoj, fare de Rafaelo Mateos.
21:30 Libera tempo por vespermanĝi.

Dimanĉo 23/10/2011

- 9:30 Prelego pri la graveco de la protektado de la medio, fare de Rafaela Urueña Álvarez.
10:30 Prelego pri la historio de Sevilá Esperanto-Asocio, fare de Antonio Rodríguez Gasch.
11:30 Konkludoj de la kongreso kaj malfermo.
12:00 Koncerto kun fina esperanto-kanto "La Espero".
14:00 Tagmanĝo kaj adiaŭo.

Lokoj kie okazos la programeroj:

- La aktoj okazontaj vendrede kaj sabate okazos ĉe la hotelo Lar, Placo Carmen Benitez 3 (Sevilo).
- La prelegoj okazontaj dimanĉe okazos ĉe la *Peña Flamenca "Pies Plomo"*, strato Dársena 22 (Sevilo)
- La koncerto okazonta dimanĉe okazos ĉe la Monahinejo "*Santa Rosalía*", strato Cardenal Spínola 8 (Sevilo).

Prelegoj kaj Prelegantoj



Jorge CAMACHO CORDÓN, Zafra (Ekstremaduro). Dum preskaŭ 10 jaroj li estis membro de la Akademio de Esperanto kaj sendube, li estas unu el la plej altvaloraj poetoj en esperanto. Li estas la aŭtoro aŭ la tradukisto de pli ol dek libroj kaj eseoj.

Nuntempe, li kunredaktas la revuon *BELETRA ALMANAKO*. Inter liaj plej konataj verkaĵoj oni devas elstari la belegajn poemarojn *Celakantoj* (2004), *Saturno* (2004), *Eklipsas* (2007) kaj *Koploj kaj filandroj* (2009). Okaze de sia prelego ĉe la Andaluzia Kongreso li parolos pri literaturo en esperanto kaj ĉefe pri poezio.

Rafaela URUEÑA ALVAREZ, (Bilbao), estas emerĝinta profesorino pri internacia juro en la Universitato de Valladolid. Dum kelkaj jaroj ŝi estis prezidantino de Hispana Esperanto-Federacio kaj nuntempe ŝi estas prezidantino de Esperanta Jura Asocio, la tutmonda asocio kie renkontiĝas esperantistoj kiuj fakas pri juro.



Ŝi verkis kelkajn librojn kaj eseojn, ĉefe pri la protektado de la mara medio, la protektao de la kulturaj havaĵoj dum militaj konfliktoj, kaj pri

profitado de maraj resursoj en Hispanio. Ŝi prelegos okaze de la Andaluzia Kongreso pri la protektado de la medio.

Antonio RODRÍGUEZ GASCH


(Sevilo), estas unu el la plej konataj esperantistoj de Sevilo, ĉar li movadas ekde antaŭ pli ol tridek jaroj. Li konas diversajn lingvojn kaj estas konata lia dediĉo al la klimatologio. Li prelegos pri la historio de la Sevila Esperanto-Asocio.




Rafaelo MATEOS GONZÁLEZ

(Onubo), profesie li estas instruisto pri lingvoj dum 25 jaroj en mez kaj altlernejoj. Li esperantiĝis antaŭ sep jaroj kaj sekvis altnivelan kurson en la Kastelo de Grezijono pri buŝa kaj skriba tradukado. Dum la lastaj jaroj, li instruis esperanton dum ses jaroj en publika biblioteko de Onubo, poste en la Kastelo de Grezijono mem, en Hungario, en Ukrainio kaj en Ĉinio.

Okaze de la 16-a Andaluzia Kongreso de Esperanto li prelegos pri *Lingvaj mitoj*, base de la libro “La lingva instikto” de Stephen Pinker.



Kongresejo kaj ĉirkaŭaĵoj



★ Flamenka Rondo (dیمانچاڀ پروگراموڀ) M muzeo ★ Hotelo LAR

Kulturaj Programeroj

✓ Prezentado de la libro “Cent jaroj da Esperanto en Sevilo”

Kiel sciante, samtempe al la okazigo de la Andaluzia Kongreso de Esperanto, okazas la unua jarcento de la internacia lingvo en Sevilo, kaj la Sevila Esperanto-Asocio deziras festi ĉi tiun jubileon pere de diversaj aktoj.

Unu el ili estas la onta publikigo de libro pri ĉi tiu unua jarcento de esperanto en Sevilo. Pri la projekto redakti la libron respondeciĝas Juan de Dios Montoto kaj Antonio Rodriguez kaj, tuj post la fino de la manuskripto Andaluzia Esperanto-Unuiĝo kaj Sevila Esperanto-Asocio, estos preta eldoni ĝin. La libro temas ĉefe pri homoj, tiu granda aro da personoj kiuj en Sevilo simpatiis al la internacia lingvo kaj dediĉis grandan aŭ malgrandan kvanton da sia vivo disvastigi ĝin.

Kompreneble, la okazintaĵoj gravas, la kongresoj kaj renkontiĝoj estas preparolindaj, tamen la kerno de la libro estos la personoj: Trinidad Soriano, Karolo Martínez, Joaquín Machuca, Rafael Fiol, Jerónimo de Córdoba, Felipe González del Río, Fernando Begines, Tomás Caspe kaj multaj aliaj ne-forgeseblaj samideanoj.

Sendube la legado de la libro estos vera ĝuo kaj espereble ĝi aperos jam dum la kuranta jaro. Vendrede vespere, Juan de Dios Montoto, unu el la kunredaktantoj de la verko parolos pri la projekto.

✓ Vizito al la Belarta Muzeo de Sevilo

Inaŭgurita en la jaro 1841, la Belarta Muzeo de Sevilo verŝajne estas la dua plej grava muzeo en Hispanio, post la madrida Muzeo *del Prado*. La unuaj artaj kontribuoj al la muzeo venis el la monaĥejoj alienitaj de la Dekreto de la liberala registaro de Mendizábal, en la jaro 1835. Pro tio la plejmulto el la pentraĵoj temas pri religiaj aferoj, ĉefe barokstilaj.

Ekde la komenco de la pasinta jarcento la enhavo de la muzeo kreskas ĉefe dank'al la donacoj de diversaj pentristoj. Lastatempe la muzeo

enriĉiĝis ĉefe dank'al la publikaj aĉetoj de la andaluzia registaro kaj al la heredaĵoj donitaj al la muzeo.

Pri la enhavo oni devas elstari pentraĵojn de sevilaj artistoj, ĉefe de la 17-a jarcento, kiel tiuj de Murillo, Velázquez, Zurbarán, Juan de Valdés Leal kaj Lucas Valdés. Ankaŭ troviĝas pentraĵo de *El Greco* "Portreto de lia filo Jorge Manuel", kaj aliaj pentristoj pli modernaj (jarcento 19-a) kiel Gonzalo Bilbao, Valeriano Bécquer kaj Eugenio Hermoso.

Pri la konstruaĵo mem, la muzeo troviĝas ĉe la historia kvartalo de la urbo. Unuamamente ĝi utilis kiel monaĥejo de la *Merced*-Ordeno. La ter-peco estis donacita de la reĝo Ferdinando la 3-a mem, post la konkero de la urbo, kondiĉe ke ĝi utilis kiel monaĥejo.

Turismaj Programeroj

✓ Vizito al kvartalo Sankta Kruco

La kvartalo Sankta Kruco troviĝas meze de la urbo Seviljo. Temas pri strataro kun blankaj domoj, familiaj palacoj kaj humilaj kortoj plenaj je floroj, kaj ĉe ĉiu strat-angulo legendoj pri amoj, honoro kaj dueloj. Origine Sankta Kruco estis la juda kvartalo de Seviljo. Tiel, kiam la reĝo Ferdinando la 3-a de Kastilio konkeris la urbon en la jaro 1248, tie ekzistis la plej grava juda komunumo de la Ibera Duoninsulo, post tiu de Toledo.



Tamen, kiam la Katolikaj Gereĝoj forpelis la judojn el Hispanio en la jaro 1492, la kvartalo preskaŭ senpopoliĝis. Komence de la 19-a jarcento okazis reurbanizado de la urbo kaj ekde tiam la kvartalo Sankta

Kruco estas simila al tiu kiu estas eble viziti nun. La stratoj estas longaj kaj mallarĝaj, tiel oni stariĝis por eviti la varmegan someran sunon de Sevilo kaj samtempe krei vent-fluojn por malvarmigi ilin. Preskaŭ ĉiuj stratoj finiĝas je tipaj placoj kie estas eble trovi tipajn trinkejojn aŭ simple benkojn por sidiĝi kaj trankvile babiladi.

La vizito al la kvartalo Sankta Kruco okazos vendrede vespere, do, la plej bona momento por promenadi sub la sevila luno, eble ankaŭ por perdiĝi tra kelka el la malarĝaj stratoj de la plej tipa sevila kvartalo.

✓ Tipa sevila manĝado (*friktita fiŝaro*) ĉe Triano

Ekzistas de-ĉiama diskuto ĉu Triano estas Sevilo aŭ ne. Tiel, kiam trianano trapasas la ponton super la Gvadalkiviro, li diras: *nu, mi iras en Sevilon*. Ĉar Triano ne estas sevila kvartalo, kompreneble ankaŭ ne urbo, Triano estas...Triano. Ĝi estas tiu parto de Sevilo kiu trapasis la riveron Gvadalkiviro, tie kie loĝis maristoj, flamenkaj artistoj, taŭroludistoj, forĝistoj, ceramikistoj kaj aliaj metioj propraj de la cigana popolo.

Ĉe ĉi tiu tipa parto de la urbo, Sevila Esperanto-Asocio deziras plezure inviti al ĉiuj gepartoprenantoj en la kongreso noktomanĝi, aŭ almenaŭ al tiuj kiuj jam estos en Sevilo vendrede vespere. Kion pri la manĝaĵoj? Nu, la plej tipa estas la friktita fiŝaro, ellaborita kun faruno kaj oliv-oleo, jen la solaj kondimentoj aldonitaj al la fiŝo mem, kaj kompreneble akompanitaj de bona vino aŭ de freŝa biro. Do, gustumu ĉi tiun bongustan noktomanĝon apud la esperantistaro. Kaj kompreneble, bonan apetiton !



✓ Koncerto

La fina akto de la Kongreso estos koncerto. Ne nur la muziko estos grava tiam, ankaŭ la scenejo, ĉar la koncerto okazos ĉe la monaĥinejo Sankta Rosalia ĉe antikva kvartalo de Sevilo, loko kie regas la silento aŭdigos kantaĵojn en esperanto.

La koncerto estos la lasta agado por festi la unuan jarcenton de esperanto en Sevilo. Orkestro de 13 muzikistoj ludos klasikan muzikon. La fina kantado de “La Espero”, la esperanto-himno, ankaŭ metos la finan punkton al la 16-a Andaluzia Kongreso de Esperanto. Multegajn dankojn al Lola García kaj al Pepe Roldán pro iliaj streboj rilate la organizadon de ĉi tiu bela programero.

Libro-Servo de Andaluzia Esperanto-Unuiĝo

Okaze de la Andaluzia Kongreso de Esperanto, nia asocio disvendos kvardekon da libroj, KD-diskojn kaj materialon pri esperanto. Inter ili troviĝos kelkaj el la verkaĵoj eldonitaj ĝis nun de Andaluzia Esperanto-Unuiĝo.



PLATERO KAJ MI

Temas pri la plej fama verkaĵo de J.R. Jiménez, sinsekvo de poemoj en prozo, en kiuj la aŭtoro, kune kun lia azeno Platero, lirike priskribas la sunoplenan vilaĝon Moguer, ties homojn kaj ties pejzaĝon.

Tradukis en esperanton: Miguel Gutiérrez Adúriz

Prezo: 8 eŭroj.



SANGA NUPTO

Unu el la plej konataj verkoj de Federico García Lorca. Unika sintezo de muziko, plastiko, scenografio, prozo kaj verso, konstituus la restarigon de la pura tragedia sur la hispanaj scenejoj. Ĝia intrigo okazas en vilaĝeto de la provinco Almerio, dum nupta ceremonio. Tradukis en esperanton: Miguel Fernández
Prezo: 6 eŭroj.

Poezio

Sur la bordoj de Gvadalkiviro

Sternas sin sur verdaj bedo vico da fortikaj ulmoj
tute apud la rivero, kiel densa lanco-ŝpruco
kun flirtantaj silkflagetoj en irado al la lukto.
Vere, ŝajnas jene rara, ke ĉi vigla arbo-trupo
preta al batalo arda kontraŭ la rivero-fluo
konsiderus ĝin ne plaĉa kiel paca proksimulo.
Militema, la rivero vestis sin per maŝa kuto
ŝtalforgita de la ventoj, kiam l'akvo laŭ faltumoj
iriziĝas per mil heloj kaj reflektas l'oran sunon.
Jam en plena ludbatalo la river'forpelis l'ulmojn
foj-refoje per la ondoj, per la ondoj kaj la fluo,
sed l'arbar' kontraŭ perforto per lerteco kaj per ruso
venkis la rivero-volon, kiu plende kun murmuroj
cedas al ulmar-ordonoj kaj akceptas la postulojn.

Abū Ishāq Ibrāīm ibn Sahl al Isrāīli
Sevilo, 1208 - 1251

Tradukis: Antonio Marco Botella

Paĝoj pri Nia Historio

Notoj pri Esperanto kaj Andaluzio

Cent jaroj da Esperanto en Sevilo

Sur la numero 75-a de *Gazeto Andaluzia* ni jam publikigis ĉi tiun artikolon, tamen nun, kiam oni jubileas la unuan jarcenton de la esperanto-movado en Sevilo, ĉi tiu listo de agadoj devas esti aktualigita kaj denove diskonigita. Do, jen reale cent jaroj da esperanto en Sevilo.

- 1911: En la monato oktobro fondiĝas la Sevila Esperanto-Asocio.
- 1912: S.E.A. starigas propran budon ĉe la Aprila Foirejo.
- 1913: Trinidad Soriano diskonigas la ideon krei Andaluzan Esperanto-Federacion. Dek unu esperantistoj renkontiĝas en Sevilo por pritrakti la aferon.
- 1914: Trinidad Soriano kaj Karolo Martínez, sevilaj esperantistoj, planas ĉeesti la Universalan Kongreson de Esperanto en Parizo. La eksplodo de la unua mondmilito malfaciligas ilian revenon en Sevilon.
- 1915: Sur artikolo verkita de Karolo Martínez en madrida ĵurnalo, oni elstarigas la laboron de la E-Movado kunlabore kun la Ruĝa Kruco, favore al la soldatoj malliberigitaj dum la milito en Eŭropo.
- 1916: La ĉeka esperantisto S-ro Cirm vizitas Sevilon. La sevilaj esperantistoj bonvenigas lin per festo en la monato novembro.



Trinidad Soriano



Karolo Martínez

- 1917: La 18-an de aprilo, la andaluzaj geesperantistoj renkontiĝas en Sevilo okaze de la 1-a Kongreso de la Andaluzaj E-Federacio.

- 1918: La 21-an de aprilo okazas en Seviljo la 2-a Andaluza Kongreso de Esperanto. Prezidas la kunvenon S-ro Trinidad Soriano.
- 1919: Okazas en la Societo de Amikoj de la Lando en Seviljo la 3-a Andaluza Kongreso de Esperanto.
- 1920: Forpasas S-ro Trinidad Soriano, animo de la sevila esperantismo.
- 1921: Karolo Martínez proponas en du sevilaĵojn ĵurnalojn la eldonadon de turismaj broŝuroj en esperanto por promocii la estontan Ibero-amerikan Ekspozicion.
- 1922: Renkontiĝas en Seviljo komitato kun reprezentantoj de 8 lokaj grupoj de Andaluzio por reorganizi la andaluzajn kongresojn de esperanto.
- 1923: La 6-an de majo okazas en Seviljo la 4-a Andaluza Kongreso de Esperanto. Prezidas ĝin la kordova S-ro Olmo.
- 1924: Reprezentantoj de la esperantistaj grupoj de Seviljo, de Villanueva del Río y Minas kaj de Tocina partoprenas en la 4-a Hispana Kongreso de Esperanto okazanta en Bilbao.
- 1925: S.E.A. kunlaboras kun la Ateneo en la Festo de la Magoj. La esperantista asocio donacas pupojn vestitajn laŭ la kutimoj de malsimilaj landoj al la sevilaĵoj orfoj.
- 1926: Hispana Esperanto-Asocio kreas la Hispanan Instituton de Esperanto, kie renkontiĝas la plej prestiĝaj esperantistoj. Unu el la unuaj nomumitaj estas la sevila Karolo Martínez.
- 1927: Prezidas S.E.A. la Pastro Jerónimo de Córdoba, prestiĝa profesoro pri latina lingvo.
- 1928: De la 5-a ĝis la 9-a de novembro okazas en Seviljo la 7-a Hispana Kongreso de Esperanto. Partoprenas 200 geesperantistoj.
- 1929: Okaze de internacia konkurso pri lerneĵaj artaĵoj, kunvokita de esperantista asocio, atingas la duan premion la Nacia Lernejo de Gilena (Seviljo).
- 1930: Okaze de diskutoj por subteni hispanan asocion kun sidejo en Madrido aŭ krei hispanan konfederacion, S.E.A. voĉdonas favore al la fondiĝo de Hispana Konfederacio.
- 1932: Esperantisto Henriko Oger, partoprenanta en la Hispana Kongreso de Esperanto, prezentas sian projekton "Tri urboj por la Paco". Laŭ tiu projekto la esperanto-grupoj de Barcelono, Madrido kaj Seviljo favorigos la okazigon de agadoj en tiuj urboj favore al la internacia paco.
- 1933: S.E.A. estas la membro n-ro 4.614 de Universala Federacio Esperantista.
- 1935: Hispana Esperantista Asocio gratulas S.E.A.-n pro la sukceso de ĝiaj agadoj favore al la disvastigo de la internacia lingvo.

- 1936: En Hispanio parolas la armiloj. Multaj geesperantistoj fuĝas, aliaj estas mortpafitaj, inter ĉi lastaj la sevila Pastro Ildelfonso Montero, eks-prezidanto de Andaluza Esperanto-Federacio.
- 1950: Oni nomumas novan estraron de Hispana Esperanto-Federacio, fondita en la jaro 1948. La sevila Federico Ribelles Giménez estas la nova vic-prezidanto.
- 1951: Grupo de italaj esperantistaj turistoj vizitas Sevilon dum la monato majo.
- 1952: En la nova estraro de Hispana Esperanto-Federacio aperas kiel voĉdonanto la sevila José María Arias de Reyna Ferrero.
- 1957: La sevila Francisco Abascal Fernández kunlaboras en la administrado de Hispana Esperanto-Federacio.
- 1959: La partoprenantoj en la 20-a Hispana Kongreso de Esperanto, okazanta en Malago, vizitas Sevilon. S-roj Rafael Fiol kaj Karolo Martínez ĉiĉeronas.
- 1960: La sevila Karolo Martínez publikigas artikolon pri Unesko kaj Esperanto en la prestiĝa cultura revuo "La Kuriero de Unesko".
- 1961: En la monato junio la sevila ĵurnalo "El Correo de Andalucía" publikigas longan kaj interesan artikolon de D-ro Arranz pri Esperanto.
- 1962: En la monato septembro Teo Jung, fondito kaj direktoro de "Heroldo de Esperanto" vizitas Sevilon. S-ro Rafael Fiol montras al li kaj al lia familio la mirindaĵojn de la urbo.



Rafael Fiol Paredes

- 1965: La revuo BOLETIN, oficiala órgano de Hispana Esperanto-Federacio, intervjuas al la sevila esperantisto S-ro Karolo Martínez Fernández.
- 1966: La revuo BOLETIN intervjuas al la S-ro Rafael Fiol Paredes.
- 1967: En la adresaro eldonita tiujare de Hispana Esperanto-Federacio aperas kvin sevilanoj.
- 1968: Du sevilanoj, Felipe González del Pino kaj Karolo Martínez, partoprenas en la 53-a Universala Kongreso de Esperanto, okazanta en Madrido.

- 1969: Hispana Esperanto-Federacio eldonas “La Lando de Alvargonzález”, tradukaĵo de Fernando de Deigo de la verkaĵo de la sevila Antonio Machado.
- 1970: La sevilaj Rafael Fiol kaj Karolo Martínez donacas 300 librojn, preskaŭ ĉiuj publikigitaj inter la jaroj 19004 kaj 1912, al la Biblioteko de Hispana Esperanto-Federacio.
- 1971: La profesoro Felipe González del Pino atingas la necesan rajtigon de la Provinca Delegito de la Ministerio pri Edukado, por organizi esperanto-kurson ĉe la Gimnazio “San Isidoro” en Sevilo.
- 1973: Fernando de Diego prezentas sian tradukon en esperanto de la verko de la sevila poeto Gustavo Adolfo Bécquer. La libro ricevas la titolon “Kun Sopira Koro”.
- 1974: La sevila esperantisto Rafael Fiol Paredes lanĉas demandon pere de la revuo BOLETIN, celanta koni kiu estas la plej veterana esperantisto en Hispanio. De la atingitaj sciigoj oni sciis, ke li mem estis la plej veterana samideano en Hispanio.
- 1975: Felipe González del Pino ekorganizas kurson de esperanto en la Nacia Lernejo “José María Izquierdo”.
- 1976: La 16-an de februaro, ĉe sidejo pruntedonita de Tomás Caspe Cereijo, oni inaŭguras la Sevilan Akademion de Esperanto.
- 1977: Grupo de junaj lernantoj de la Sevila Akademio de Esperanto eldonas la revuon “Andalucio”.
- 1978: Okaze de la nova strukturo de Hispana Esperanto-Federacio, ĉi tiu organizo nomumas delegiton en Andaluzio la sevilan Tomás Caspe.
- 1979: Malgraŭ la fakto, ke en ĝi ne aperas specife la vorto “Esperanto”, la Granda Enciklopedo de Andaluzio, eldonita tiujare en Sevilo, informas pri José Garzón Ruiz, aŭtoro de kelkaj laborj en esperanto kaj fondito de la revuo “Gazeto Andaluzia”.
- 1980: S-ro Rafael Fiol Paredes, delegito en Sevilo de Universala Esperanto-Asocio, estas nomumita honora membro de Hispana Esperanto-Federacio.
- 1981: La inform-programo TeleSur, de la andaluza delegacio de Hispana Radio-Televido, intervujas al kelkaj sevilaj partoprenantoj en la tiujara Hispana Kongreso de Esperanto, okazinta en Murcio.
- 1982: La nova asocio SEJO (Sevilja Esperantista Junulara Organizo) eldonas novan publikajon “Revuo de SEJO”.
- 1983: Post partopreni en la 1-a Andaluzia Kongreso de Esperanto, okazinta en Kordovo, kvar radio-elsendejoj intervujas al sevilaj esperantistoj.
- 1984: Okazas en Sevilo la 44-a Hispana Kongreso de Esperanto. La Sevila Urbodomo eldonas turismajn broŝurojn en esperanto.

- 1985: Okazas en Seviljo la 3-a Andaluza Kongreso de Esperanto, sub la temo "Informadiko kaj Esperanto".
- 1986: Komenciĝas en la sidejo de Seviljo Akademio de Esperanto la "Ĵaŭdaj Parolhoroj". Temis pri mallonga prelego kaj posta debato kiu ĉiujn estis organizata de membro de la Akademio. La lingvo uzita nur povus esti esperanto.
- 1987: La sidejo de Hispana Esperantista Junulara Organizo translokiĝas al Seviljo. Alberto Franco Ramírez estas la nova prezidanto de tiu junulara organizo.
- 1988: En la monato februaro komenciĝas nova elementa kurso en la Akademio. La seviljo ĵurnalo ABC informas pri tiu kaj aliaj agadoj favore la disvastigon de la internacia lingvo.
- 1989: La estraron de Andaluza Esperanto-Unuiĝo presidas ekde tiu jaro la seviljo Juan de Dios Montoto.
- 1990: Forpasas S-ro Rafael Fiol Paredes, la memoro de la esperanto-movado en Seviljo.
- 1991: Forpasas S-ro Tomás Caspe Cereijo, la ne-forgesebla *Antolín*, la reorganizanto de la esperanto-movado en Seviljo dum la 7-a jardeko.
- 1992: La reklamo de nova parfumo "*Agua de Sevilla*" bonvenitas al la vizitantoj de la Universala Ekspozicio pere de reklamo ĉe la ĵurnalo ABC en diversaj lingvoj. "Estu bonvenaj" aperas inter ili.
- 1994: Alberto Franco Ramírez organizas elementan kurson de esperanto en la Universitato de Seviljo.
- 1996: La seviljo libro-vendejo *Interbook* ekvendas la novan libro-metodon de esperanto verkita de Miguel Gutiérrez Adúriz "Curso de la Lengua Internacional Esperanto".
- 1997: Oni ekuzas la unuan elektronikan adreson de la esperanto movado en Seviljo: espersev@arrakis.es
- 1998: Okaze de la 18-a Internacia Pup-Teatra Festivalo de Seviljo, la japana ensemblo *Shonai Dewa Ningyo Shibai* prezentas sian spektaklon en esperanto.
- 1999: Aperas la unua TTT-paĝo en Seviljo dediĉita al esperanto: "Andaluza Reto".
- 2000: Andaluza Esperanto-Unuiĝo aprobas, ene de sia programo "Esperanto en Bibliotekoj", donaci ekzempleron de libro-metodo en esperanto al publikaj bibliotekoj de pli ol 10 vilaĝoj en Seviljo.
- 2001: Malgranda grupo de esperantistoj renkontiĝas ĉiusemajne ĉe la "Ateneo Verde".

- 2002: La 2-an de septembro aperas artikolo en la ĵurnalo “Diario de Sevilla” sub la titolo “*Recuperar el Esperanto*”, kie oni informas pri la agadoj de Juan de Dios Montoto por atingi konitaĵojn pri la historio de la esperanto-movado en Seviljo.
- 2003: La 20-an de novembro Juan de Dios Montoto prelegas ĉe la Centro pri Hispan-Amerikaj Studoj en Seviljo pri la temo “Blas Infante kaj Esperanto”.
- 2004: Oni reorganizas la Sevilan Esperanto-Asocio. Okazas en la kultura municipa centro “Casa de las Sirenas” la 10-a Andaluzia Kongreso de Esperanto.
- 2005: La 14-an de marto la radio-elsendejo “Radio Sevilla” elsendas programon pri esperanto.
- 2006: Okaze de la Internacia Ekspozicio pri Nuntempa Arto de Seviljo estas disdonataj de la organizantoj de tiu arta ekspozicio bonvenigaj afiŝoj en 200 balkonoj de la urbo. La teksto de la afiŝo estas esperanto-vorto “Bonveno”.
- 2008: De la monato februaro ĝis junio okazis kurso de esperanto, sen akademia valoro, ĉe la Fakultato de Filologio de la Universitato de Seviljo.
- 2009: En la monato junio aperas la nova TTT-paĝo de S.E.A. www.esperantosevilla.org
- 2010: La 4-an de novembro komenciĝis nova elementa kurso de esperanto ĉe la kultura municipa domo “Casa de las Sirenas”.
- 2011: S.E.A. jubileas sian unuan jarcenton.

1911

2011

Centjariĝo de la Esperanto-Movado en Seviljo

**A.S.E.**

Asociación Sevillana de Esperanto

FLAMENKO

La dimanĉaj programeroj de la 16-a Andaluza Kongreso de Esperanto okazos ĉe la Flamenka Rondo “Pies Plomo”. Ĝi situas ĉe antikva strato apud la rivero Gvadalkiviro kaj ĝia nomo estas omaĝo al unu el la plej puraj sevilaj flamenkaj kantistoj: Manuel Giorgio Gutiérrez, pli bone konata kiel *Pies Plomo*.

Li naskiĝis en Sevilo en la jaro 1924. Verdire li neniam estis profesia kantisto, ja li estis boatisto ĉe la rivero Gvadalkiviro, eble pro tio li estas unu el la plej karaj kantistoj de la sevilaj flamenkoj. Lia kantaĵo, esence cigana, plenplenas de arto kaj talento. Li edziĝis al Tomasa, konata flamenka kantistino, kaj li estas la patro de ankaŭ fama kantisto “José de la Tomasa”.



Kiel dirite, lia laboro disvolviĝis ĉe la Gvadalkiviro, eble pro tio la rivero estas konstanta temo en sia kantaro. Jen kelkaj *naturaj fandangoj* de Pies Plomo:

*Obskuraj kaj silentaj
estas la noktoj de l'rivero.
Ĉe ne mia boato bruas,
tiel mi ne vekas
la dormantojn ĉe l'rivero*

*La juĝon oni legis
al tiu kompatinda homo.
Sed antaŭ Kristo li ĵuris
kaj proklamis sian senkulpecon.
Sed neniu pardonis lin.*

ALIĜU AL
Andaluzia Esperanto-Unuiĝo

Se Vi deziras kunlabori en la disvastigado de la internacia lingvo en Andaluzio, jen Via asocio.

Por aliĝi al AEU kontaktu kun: andaluciaesperanto@gmail.com
Jara Kotizo: 20 € pagebla ĉe unu el la jenaj kontoj:

- Caja General de Ahorros de Granada
2031 0225 54 0100187657
- BBVA
0182 4106 71 0207160717

Okaze de la pago de la jara kotizo bv. informi pri la jenaj sciigoj:

- Nomo de la aliĝanto.
- Afero: Kotizo 2011

DANKON! Ni bezonas ĉies helpon kaj apogon.



HUMURO



La Kandidato Rubalcaba asertas, ke la televid-programoj por infanoj devus NUR uzi la anglan lingvon.

Perfekte! Tiel, la gepatroj povos realigi sian rajton elekti.....



... vidi programojn,
ĉu de Britio, ĉu de Usono.

La rajto elekti ja estas libereco !



Misteroj kaj Legendoj de Andaluzio

La sevila strato Sierpes

Se okaze de la Kongreso Vi havas la ŝancon promenadi tra la centra kvartalo de Seviljo, Vi trovos tie la plej komercan straton en la urbo, temas pri la strato *Sierpes*, la vorto *Sierpe* en la hispana lingvo signifas: serpento. La strato estas ege antikva, jam aperas sur kelkaj verkaĵoj verkitaj fine de la 15-a jarcento. Kaj post tiuj jaroj okazis tio, kio estas la origino de la nomo de ĉi tiu strato, kvankam ne ĉiuj konas la rakonton.



Dum tiuj jaroj mistere malaperis kelkaj infanoj en tiu strato, pro tio la urbestro de la urbo S-ro Alfonso de Cárdenas donis la alarmon. Okazis tiam, ke ne-konatulo informis sekrete al la aŭtoritatoj pri la kaŭzo de tiuj malaperoj, tamen li sciigus pri ĉio kondiĉe

ke oni liberigu prizonulon el la sevila malliberejo. La sevila urbestro unuamomente akceptis, tamen por doni la liberecon al prizonulo devus unue koni la kaŭzon de tiuj strangaj kaj teruraj okazintaĵoj.

La sekreta informanto estis Melchor de Quintana y Argüeso, kiu restis malliberigita por ribelo kontraŭ la reĝo, do, li petis sian propran liberecon kontraŭ la informo pri la kialo de la malaperoj en tiu strato. La urbodoma sekretario iris en la malliberejon por skribi la rakonton. Laŭ Melchor de Quintana, li mem pruvis fuĝi el la prizono,

kiu ĝuste troviĝis fine de la strato. Cele al tio li fosis tunelon kiu irigis lin en la antikvajn subterajn romiajn kaj arabajn galeriojn de Sevilo.

Li ne dubis fuĝi, tamen ĉe la subteraj galerioj li trovis ion, la kaŭzanton de la malaperoj kaj mortoj de tiuj infanoj. Melchor de Quintana luktis kontraŭ ĝin kaj finfine li sukcesis mortigi tiun strangan beston. Tiam, li decidis ne fuĝi sed reveni en la malliberejon. Sub la ordonoj de la sevila urbestro, la soldatoj eniris en la subterajn galeriojn kaj tie li trovis, apud infanaj ostoj, la korpon de serpento. La beston finfine oni montris publike ĉe la strato kiu nuntempe nomiĝas *Sierpes*, tio estas: serpento.

J.M.R.H.



ANDALUZA KUIRARTO

Paviaj soldadetoj laŭ la andaluza stilo

Dum la 19-a jarcento la soldatoj de la regimento de la ĝeneralo Pavia uzis flavan uniformon. Same, la fina rezulto de la jena manĝaĵo estas friktita fiŝo en flava kovrilo, pro tio, ĉi tiu speciala maniero kuiru moruon estas konata kiel “paviaj soldadetoj”.

Jen la ingredientoj:

- 750 gramoj da moruo.
- 250 gramoj da faruno.
- 2 citronoj.
- 1 glaseto de brando.
- 2 ajleroj.
- ½ litro da oliv-oleo.
- Dolĉa papriko.
- Safrano
- Nigra papriko.
- Salo
- 500 gramoj da verdaj fazeoloj.
- 4 terpomoj.
- Pulvora fermento.

Jen la ellaborado:

1) Se la moruo ankoraŭ estas ensaligita estos necese sensaligi ĝin, pro tio ni enmetos la moruon ene de akvo dum 24 horoj kun 3 akvo-ŝanĝoj. Do, se eble aĉetu sensaligitan moruon.

2) Tranĉu la moruon laŭ longaj bendoj, pli-malpli kiel la jena bildo:



3) Ni preparu miksaĵon per oleo, la suko de la du citronoj, dolĉa papriko kaj la nigra papriko. Enmergu la moruon en tiun saŭcon dum unu horo.


4) Ni preparu nun la kovrilon de la moruo. Estos necese miksi farunon kun pulvora fermento, brando, oleo, safruno kaj iomete da salo. La miksaĵo devas fermenti dum du horoj. Post tiu tempo kovru la moruon per ĉi tiu miksaĵo.

5) Ni preparu la akompanantojn de la moruo. Senŝeligu la terpomojn, poste tranĉu ilin laŭ grandaj kuboĵ. Same, tranĉu la verdajn fazeolojn kaj bolu terpomojn kaj fazeolojn plus salo dum 20 minutoj.

6) Ene de pato kun oliv-oleo ni friktu la moruon, kovrita de la salso ellaborita per la faruno kaj la ceteraj ingredientoj.

Oni prezentas la moruon akompanataj de la fazeoloj kaj la terpomoj. Estas eble anstataŭi la fazeoloj kaj la terpomoj de aliaj manĝaĵoj, ekzemple laktuko.

Bonan Apetiton !



NOTOJ

Andaluzia Esperanto-Unuiĝo
Asociación Andaluza de Esperanto



Andaluzia Esperanto-Unuiĝo estas la asocio kiu strebas al la disvastigo de la internacia lingvo Esperanto en Andaluzio.
Ĝi fondiĝis en la jaro 1984a danke al la iniciato de geesperantistoj de la provincoj Malago, Sevilo kaj Kordovo. Hodiaŭ apartenas kaj kunlaboras kun A.E.U. geesperantistoj de la tuta Andaluzio kaj eĉ ekster ĝi.

Estraro

Prezidanto : Angel Arquillos López
Sekretario: Julio Herrero Segura
Kasistino: María Dolores Torres Mateo
Voĉdonanto pri Propagando: José María Rodríguez Hernández

Adreso: C/ Ánfora 6 5-D 29013 Málaga

E-Adresoj: angelarquillos@gmail.com
esperanto14@ono.com

Blogo: www.andaluciaesperanto.blogspot.com
TTT-paĝo: www.esperantoandalucia.com

Aliaj interesaj adresoj de la Esperanto-Movado

- * Universala Esperanto-Asocio
Nieuwe Binnenweg 176 NL-3015 BJ Rotterdam (Nederlando)
uea@inter.nl.net
- * Hispana Esperanto-Federacio
C/ Rodríguez San Pedro 13-3-7 28015 MADRID (Hispanio)
admin@esperanto-es.net

La Espero

En la mondon venis nova sento,
tra la mondo iras forta voko;
perflugiloj de facila vento
nun de loko flugu ĝi al loko.

Ne al glavo sangon soifanta
ĝi la homan tiras familion:
al la mond' eterne militanta
ĝi promesas sanktan harmonion.

Sub la sankta signo de l' espero
kolektiĝas pacaj batalantoj,
kaj rapide kreskas la afero
per laboro de la esperantoj.

Forte staras muroj de miljaroj
inter la popoloj dividitaj;
sed dissaltos la obstinaj baroj,
per la sankta amo disbatitaj.

Sur neŭtrala lingva fundamento,
komprenante unu la alian,
la popoloj faros en konsento
unu grandan rondon familian.

Nia diligenta kolegaro
en laboro paca ne laciĝos,
ĝis la bela sonĝo de l' homaro
por eterna ben' efektiviĝos